

Bulgara ESPERANTISTO



- * * * Ni plijunigu niajn vicojn! . . . 1
Krâstju Karucin. Vivo plena je dignoj
 (80-jariĝo de Radoslav Triĉkov) . . . 2
Penka Papazova. Ĉe mateniĝo 5
Kosta Konstantinov. La granda amiko de
 Esperanto Krâstju Stanĉev 4
Akad. Vl. Topenĉarov. Sofio — la koro
 de Bulgario 5
Dimi Raŝajkova. Vasil Petleŝkov — he-
 roo kaj martiro de la bulgara popolo 6
 * * * Organiza vivo 8
Izabela Oĵiuniene. La revoj efektivigis
Coĉo Kolarov. Aktiva E-agado en GDR
 (intervjuo kun d-ro Detlev Blanke) . . 10
Janina Pierog. Nekutima jubileo 12
Dimitro Haĝiev. La ekzisto de d-ro Hil-
 lerson pruvita 13
Violin Oljanov. Ĉu samaj metodoj por
 ĉiuj? 14
Dimitro Terziev. La infana kanto kaj la
 internaciisma edukado 15
 * * * La dolĉa vivo geedza (humuraĵoj) 16
Elvira Lippe. Mi konas la kolorojn. . .
 Kion ŝatas birdoj III
 * * * Junpionira E-kurso III
 * * * Deziras korespondi II-IV

Sur la kovrilpaĝo :

La partoprenintoj en la junulara E-konfe-
 renco en Varno (vd. paĝon 9)

Foto: Lasto Nikov



Bulgario

Diana Dakova — ul. Ĥristo Botev 21-A,
 5500 Loveĉ (22-jara fraŭlino — en angla,
 germana, rusa, E-o).

Eliza Ljubenova — 3770 v. Arĉar, Vi-
 dinsko (23-jara fraŭlino)

Mariana Doĉeva — ruska gimnazija, 5550
 Dojrenci, Loveŝko (lernantino)

D-ro Zdravka Popova — p. k. 32, 8900
 Nova Zagora (52-jara kuracistino — kun
 e-istoj el USSR, Italio, Francio, Suda
 Ameriko)

Mariana Bojanova Petkova — ul. Asen
 Zlatarov 44, 5800 Pleven (15-jara lernan-
 tino — muziko, lit-ro, pm, gr. diskoj)

Gekuracistoj kaj flegistinoj — tutmonde.
 Skribu al ilia kursgvidantino: S-ino Rajna
 Kasabova, ul. Kiril i Metodi 84, 9700 Su-
 men.

24 lernantinoj de industria kemio, 16—19-
 jaraj, dez. korespondi tutmonde. Komuna
 adreso: Tehnikum po industrialna himija
 „Asen Zlatarov“, 5250 Sviŝtov. Elektu-
 unu el la nomoj kaj uzu la komunan adre-
 son:

Vanja Cvetanova, Veska Tiĥolova, Vio-
 leta Dimitrova, Daniela Kirilova, Emine
 Ibrjamova, Nela Stefanova, Fatme Sefte-
 rova, Njurtan Kadirova, Duĉka Voden-
 ĉarova, Neriman Ahmedova, Penka Kân-
 ĉeva, Anusela Nikolova, Rosica Jonova,
 Boltjan Seizova, Sijka Cvetanova, Dimka
 Todorova, Sneĵa Miteva, Elza Jordanova,
 Margarita Vojkarova, Sonja Dimitrova,
 Marieta Ivanova, Dimitrinka Jordanova,
 Veliĉka Varamezova, Rosica Atanasova.

GDR

D-ro ing. Wolfgang Müller, 20 Neubran-
 denburg, Petrosavodskestr. 62 (45-jara —
 kun samaĝuloj pri akvomastrumado ka).

Karl Felkel — 2082 Feldberg, Haus am
 See (44-jara, kun ĉel pri ŝako, fiŝkaptado
 ka).

Gekursanoj de Radoslav Triĉkov ekskurse
 tra la Balkano (1928 j.). Triĉkov sidas en la
 unua vico. La antaŭlasta staranto estas Jordan
 Ljutibrodski — fama antifaŝisto, pendumita en
 1935 pro revolucia agado.

La foton disponigis al ni k-dino Ekaterina
 Miĥajlova el Sofio, tiutempe lernantino en
 Vraca (staras en la unua vico, la dua dekstre).

(Vidu paĝon 2)



NI PLIJUNIGU NIAJN VICOJN!

La problemo pri plijunigo de la vicoj estas unu el la plej gravaj por ĉiuj organizoj kaj movadoj. Ĝi kuŝas en la fundamento de la sukceso. La partopreno de sufiĉa junularo en iu movado aŭ organizo estas garantio, ke tiu movado aŭ organizo ne mortos. Tiu ĉi vivpruvita regulo plene validas ankaŭ por nia E-movado. Ĝuste pro tio niaj estraroj je ĉiuj niveloj apartigas tion da atento al ĉi problemo.

Dum la lastaj jaroj ni atingis iujn sukcesojn rilate al la junularo. Pli-vigliĝis la junularaj grupoj enkadre de multaj E-societoj, estis fonditaj novaj junularaj, studentaj kaj mezlernejanaĵ societoj. La pli granda parto de kelkaj societoj kiel tiu de Gâlâbovo, Dospat, Petriĉ, Kubrat k. a., estas junulara. Tio ĉi fariĝis ebla dank' al la bona kaj diversflanka agado, kiun disvolvis la estraroj de tiuj societoj. La konferenco por suda Bulgario, organizita de la CE de BEA fine de novembro 1978 en Stara Zagora, la landa konferenco de la studentoj e-istoj komence de decembro 1978 en Sofio, la nacia konferenco kaj recitalo de la mezlernejana E-junularo februarie en Jambol kaj la konferenco de la nordbulgara E-junularo en Varno la 11an de marto 1979, en kiuj reprezentantoj de la E-junularo el diversaj urboj interŝanĝis spertojn el sia laboro, montris, ke al tiuj societoj, en kiuj viglas interesa kaj varia agado, venas plej multe da junaj homoj. Tio ĉi signifas, unue, ke ni devas plibonigi la organizan staton de niaj E-societoj. Due, ni devas ĉiam konsideri la specifan karakteron de la junulara aĝo kaj problemaro, kiujn oni ofte subtaksas aŭ tute forgesas. La junularo volas ne nur diskuti pri E-problemoj, sed ankaŭ amuziĝi, ekskursi k. t. p., kaj ni devas fari ĉion, kio dependas de ni, por certigi al ĝi kompetentan helpon ĉe organizado de similaj aranĝoj. Nur tiel ni povos kapti la koron de la junularo.

Tamen ĉio ĉi malfacile povas okazi sur la propra bazo de la societoj. Ili ne ĉiam havas kompetentulojn kaj bone aranĝitajn klubojn kun kondiĉoj respondantaj al la pli altaj nuntempaj postuloj de la junularo. Pro tio la agado de niaj societaj estraroj devas esti direktita al **komuna laboro kun la junularaj domoj kaj kluboj**, kiuj ekzistas en ĉiuj urboj kaj pli grandaj vilaĝoj. Tiumaniere ni komencos labori en la plej natura junulara medio, ricevos kompetentan organizan helpon, uzos la bonegan materialan bazon de la junularaj palacoj. Se ni ne faros tion, ni izoliĝos de la junulara medio kaj nenion atingos nur per propraj fortoj. La formo de inkluzivo en la komunan laboron povas esti diversa — klubo „Esperanto“, klubo de la esperantisto, klubo de internacia amikeco k. a., sed la enhavo — la edukado en spirito de internacia amikeco — estas la sama, por ĝi laboras kaj niaj E-societoj kaj grupoj, kaj la junularaj domoj kaj kluboj. La rezultoj, kiel montras la ĝisnunaj provoj, estas bonaj, do tio devas esti la vojo, kiun ni sekvu. Tiel ni certe plilarĝigos la junularajn vicojn kaj plialtigos la nivelon de la E-laboro inter la junularo.



Pro la sama kaŭzo al la societaj estraroj kiel respondeculoj por la junulara agado ni devas koopti la plej elstarajn gejunulojn, komsomolajn aktivulojn, konvenajn personojn, kiuj sukcesos plivigligi kaj plibonigi la laboron inter la junularo kaj tiel plijunigi nian Movadon.

VIVO PLENA JE DIGNOJ

Intervjuo kun la E-veterano Radoslav Tričkov

Estimata kamarado kaj samideano Tričkov, nia kara veterano, la jarkalkulo montras 80-jariĝon, malgraŭ ke via aspekto tute ne kredigas tion. Alia kalkulo montras 65-jariĝon de via esperantistiĝo. Kiaj pensoj okupas vin en tiu sublima momento?



Okdekjariĝo! Ja tio estas honorplena aĝo. Gi vekas en la homo kaj fieron, kaj meditado. Okdek jarojn en la plej tempesta periodo de la homara historio — tri militoj, la Granda Oktobra Revolucio, tri popolaj ribeloj en nia lando: la Soldato en 1918, la Septembra Antifaŝista en 1923, la venka popola je la 9a de septembro 1944. La konscio, ke la pasita vivo ne estas vana, ke mi donis mian modestan kontribuon en la batalo por progreso kaj libero, vekas ĝojon. Sed foj-foje alflugas iom da tristo — proksimiĝas la biologia limpunkto. La tristajn pensojn tamen mi ĉiam intence forpelas. . .

En 1916 el la lerneja benko oni sendis min al la Militista Lernejo por oficiroj en Sofio. Mi partoprenis rondon de junkroj, en kiu regis progresemaĵoj — ni kondamnis la militarismon kaj ŝovinismon. En tiu rondo partoprenis ankaŭ la poste fama, tutpopole amata proleta poeto Hristo Smirnenski. Kiam en septembro 1918 oni sendis nin kontraŭ la ribelintaj soldatoj apud v. Vladaja, ni rezignis pafi kontraŭ ili. En septembro

1923, ĵus reveninta el eksterlando post kvarjara foresto, mi partoprenis la popolan antifaŝistan ribelon. Post ĝia frakaso oni mortkondamnis min, sed hazarde la kondamno restis neplenumita.

Poste mi fariĝis instruisto (sed ne por longe, ĉar la faŝista registaro malpermesis al mi esti instruisto pro miaj komunismaj ideoj). Kiel aganto en la popolaj legejoj kaj kiel e-isto, mi multon faris por vekigi la politikan konscion de la popolamasoj. Mobilizita kiel rezerva oficiro dum la Dua Mondmilito, kiam la bulgara popolo per armilo batalis kontraŭ la monarkofaŝismo, kapitalismo kaj la naziaj okupantoj, mi ĉiam sukcesis, ke miaj soldatoj ne pafu kontraŭ la popolajn partizanojn. En la revoluciaj tagoj de septembro 1944 ili inde kontribuis por la firmigo de la popola regpotenco. Dum la jaroj de la popola regado mi donis kontribuon por la konstruo de nova, socialisma vivo. Mi diris „donis“, sed pli ĝuste estus, se mi dirus „donas“. Ja mi ankoraŭ ne estas kaduka, mi ankoraŭ havas kion fari.

Ion pri via unua kontakto kun Esperanto?

Mia konatiĝo kun E-o estis tute hazarda kaj interesa. En 1914 j. mi venis en urbon Vraca el mia naskiĝvilaĝo por lerni en la gimnazio. Mi luis ĉambron en la sama domo, kie dum la jaroj 1902—1904 loĝis la eminenta bulgara esperantisto Ivan Krestanov, tiam gimnaziano. Kiam li forlasis la urbon, restis ne aranĝitaj lupagoj. La dommastriro detenis parton de lia havaĵo, inkluzive la bibliotekon. Inter la ceteraj volumoj mi trafis la modestan „Ruĝan Broŝuron“ kun informoj pri E-o kaj konciza gramatiko de la lingvo. Min forte impresis la facileco de E-o kaj la vastaj eblecoj kontakti per ĝi kun la tuta mondo. Tuj mi komencis aŭtodidakte studi la lingvon kaj en mallonga tempo atingis rimarkindan sukceson. La instruisto de franca lingvo en la gimnazio admonis min forlasi tiun strangaĵon, sed mi tion ne faris.

En tiu tempo eble mi estis la sola e-isto en Vraca. Mi komencis korespondi kun e-istoj en la lando. Bone mi memoras, ke mia unua korespondanto estis Stefan Minikov, instruisto en Sofio, nuna E-doĵeno en Bulgario. Mi komencis ankaŭ internacian korespondadon. En la kondiĉoj de la Unua Mondmilito mi korespondis kun eksterlando



pere de UEA (ĝia sidejo estis en neŭtrala Svisio), kies membro seninterrompe mi estas ekde tiam. En la Militista Lernejo mi gvidis dum 1917—1918 E-rondon. En ĝi partoprenis la junkroj Ivan Kotov el Vraca, Ivan Ovčarov el Stanimaka (nuna Asenovgrad), la konata poste opereta artisto Asen Ruskov, eĉ, kiel mi diris, la poeto Ĥristo Smirnenski ka. La unuaj du fariĝis bonaj e-istoj kaj vigle partoprenis la Movadon. Asen Ruskov bone sukcesis en la lernado, sed poste dediĉis sin al la arto kaj perdis intereson al nia afero. Ĥristo Smirnenski ne estis sufiĉe regula, ĉiujn fortojn li dediĉis al la poezio.

La lan de januaro 1924 rezulte de miaj klopodoj en Vraca estis fondita la E-Societo „Sukceso“. Ĝi tuj fariĝis centro de aktiveco kun progresema karaktero — kursoj, prelegoj, kulturaj kaj belartaj aranĝoj, internacia korespondado. La aŭtoritato de lasocieto kreskis. Kreskis ankaŭ la persekuto fare de la faŝistaj regantoj — ili ĉiel penadis sufoki la societon, sed neniam atingis tion. En la vicoj de „Sukceso“ bolis vigleco. Partoprenis la kursojn kaj iĝis esperantistoj la postaj eminentuloj akademiano Evgeni Kamenov, lia frato Bojan Kamenov, d-ro Georgi Maŝdrakov, d-ro Ĥristo Manĉev (forpasinta), d-ro Stefan Dimitrov, kirurgo de la Respubliko, la verkistoj Stojan C. Daskalov kaj Pelin Velkov ka. Centojn da kursoj mi gvidis en Vraca kaj ĝia distrikto, en aliaj loĝlokoj kiel Veliko Tŕrnovo, Gabrovo, Sevlievo, Loveĉ, Ugŕrĉin ktp.

Kiajn eblojn donis E-o al vi por konatiĝi kun la mondo?

E-o estas nemezurebla rimedo por interrilatoj de homoj el diversaj landoj de la mondo. Tuj post ellerno de la lingvo mi komencis korespondi kun eksterlandaj e-istoj. Personan kontakton kun alilandaj e-istoj por unua fojo mi havis en 1920, kiam mi iris en Vienon por studi agronomion. Post iom da tempo mi decidis veturi al Usono por tie daŭrigi la studadon, sed oni ne permesis eniron, ĉar mi estis civitano de lando, kiu militis kontraŭ Usono. Tiam mi direktis min al Meksikio. En tiu lando tre gastame akceptis min kaj multe komplezis al mi s-nino Matilda Huanda, kiu antaŭ la milito estis vizitinta Bulgarion kaj gastis as Vasil Gaŝevski en Bjala Slatina, distrikto de Vraca. Poste mi veturis al Venezuelo. En tiu lando mi gastis ĉe s-ano Hesus Faria, bankoficisto, patro de 12 infanoj. La sekva lando en Sud-Ameriko, kiun mi vizitis, estas Brazilo. Mi estis en Pernambuko, en la ĉefurbo Rio de Janeiro, en Santos ka. Ĉie mi estis volonte helpata de la lokaj e-istoj.

Pli longe mi restis en Argentino. En la ĉefurbo Buenos Aires mi kontaktiĝis kun la Argentina E-Ligo, kies prezidanto Iglesias, tre larĝanime komplezis min. Tiutempe mia

mono jam entute elspeziĝis, tial mi devis iom perlabori. Mi amikiĝis kun la bulgara elmigrinto Boris Sivaĉev, iom poste konata bulgara verkisto. Kun li ni iris al la Centra Pampo por labori dum la rikoltado. Sekvis dungigo en la Sudaj Fervojoj, ĉe petrolaj fontoj ka. Dank' al la helpo de argentina s-ano mi vizitis ankaŭ la Falklonajn Insulojn (posedo de Argentino). Revene al Bulgario mi vizitis Kanariajn Insulojn, Angolon kaj Senegalon en Afriko, Italion. En Bulgarion mi revenis en aprilo 1923.

Ekkoni la mondon kaj starigi kontaktojn kun homoj el plej diversaj nacioj mi havis eblecojn ankaŭ dum la Unversalaj Kongresoj de E-o. Mi partoprenis la UK en Dancig (nuna Gdansk) — 1927, Budapeŝto — 1929 kaj 1966, Varsovio — 1959, Hago — 1964, Tokio — 1965, Vieno — 1970, Portland — 1972, Kopenhago — 1975, Rejkjaviko — 1977. Kompreneble, ankaŭ la UK en Bulgario (Sofio — 1963, Varno — 1978).

Ĉu E-o helpis al vi en via profesia laboro?

Mia vojaĝo tra la mondo estis por mi vera universitato. Mi lernis multon pri diversaj landoj kaj popoloj. Kiam poste mi laboris kiel instruisto, mi estis tre elstara pri la fako geografio. Dum la instruado pri geografio mi baziĝis ne nur sur miaj impresoj dum la vojaĝoj eksterlanden, sed ankaŭ — kaj tre ofte — sur la aktuala materialo, havigita pere de mia E-korespondado kun fremdaj landoj. La lernejinspektoroj, kiuj ne ŝatis min pro miaj politikaj konceptoj, ne povis nei miajn atingojn dum la instruado.

Kiuj el viaj E-travivaĵoj lasis plej fortajn postsekvajn en via memoro?

Miaj esperantistaj travivaĵoj estas multegaj kaj diversspecaj. Ekzemple dum mia loĝado en Argentino mi eĉ fianĉiĝis per E-o al fraŭlino Lidia Kledes el Boŝia Blanka, sed malfeliĉo trafis nin — ŝi subite forpasis.

Profundan spuron en mia memoro lasis mia renkontigo kun la eminentaj sovetaj e-istoj prof. Ernest Drezen kaj la poeto Nikolao Nekrasov dum la UK en Dancig. Impresis min ilia eksterordinara erudicio kaj iliaj konceptoj pri la Internacia Lingvo (Sur. p. 4)

TRE GRAVA!

Societaj estraroj! Aktivuloj! Amikoj de „Bulgara Esperantisto“! Ankoraŭ restas libera negranda kvanto de la revuo por la kuranta jaro.

Ni varme petas: ĉiu E-societo kolektu ankoraŭ kelkajn abonojn, aparte inter la novaj e-istoj! Abonigu ankaŭ vian lokan legejon (kulturdomon)!

Ni nepre atingu 6100!

kaj la E-movado. La renkontiĝo kaj la interparolo kun ili neniam paliĝas en mia memoro.

Diru, mi petas, kelkajn vortojn pri la nuna E-generacio!

Al la nuntempa bulgara junularo, kiu vivas ĉe tre favoraj kondiĉoj por spirita supreniro, mi bondeziras plene konscii la utilon de E-o en ĉiuj sferoj, ellerni bone la

iingvon kaj uzi ĝin en siaj vivo kaj laboro. Al la juna E-generacio mi aparte bondeziras plimultigi la sukcesojn sur la nobla E-kampo. Al ĉiuj e-istoj — novajn grandajn venkojn en la batalo por forigo de la militoj el la Internacia vivo, por interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj sur nia planedo!

Intervjuinto: Krâstju Karuĉin

LA GRANDA AMIKO DE ESPERANTO KRÂSTJU STANĈEV

Jam 100 jaroj ekde la naskiĝo de Krâstju Stanĉev — elstara bulgara ĵurnalisto kaj granda amiko de la e-istoj kaj E-o. Li naskiĝis en 1879 en la vigla balkana urbo Kotel. Parenco de famaj bulgaraj renesanculoj — Georgi Rakovski, Gavril Krâstevič, St. Izvorski, li estis ankaŭ nevo de

POEZIO kaj BELLETRO

Penka Papazova

ĈE MATENIĜO

Ĉe mateniĝo
silentiĝas ĉio. . .
Ĉe mateniĝo
la sonĝo
estas
plej dolĉa.
Ĉe mateniĝo
vekiga la floroj,
kaj la birdoj
komencas
sian kanton.
Ĉe mateniĝo
eklaboras
la homoj. . .

Nova penso
kun la unua radio
ekbrilas.
Ĉe mateniĝo
oni mortigis
malliberulojn.
Ĉe mateniĝo
la militoj
komenciĝis.
Ĉe mateniĝo
nun en Vjetnamio
oni murdas
homojn. . .
Ĉe mateniĝo
la patrinoj
ne dormas.
Infanoj
mortas.
Maljunuloj
perdas
sian hejmon. . .

Ĉe mateniĝo
tago
kun nokto
renkontiĝas!

marĉo, 1979



Krâstju Mirski — unu el la unuaj E-agan-
toj en nia lando. Gimnazion Stanĉev finis
en u. Varno, studante samtempe kun la
granda filo de nia popolo Vasil Kolarov.
Ili ambaŭ organizis marksisman rondeton
kaj eldonis mane skribatan ĵurnalon „Ler-
nejana Voĉo“.

Post la gimnazio Stanĉev unu jaron estis
instruisto en u. Sliven, kie li amikiĝis kun
la granda politika aganto Georgi Kirkov.
Poste li komencis studi juron en la Sofia
Universitato, sed pro partopreno en stu-
denta protesta mitingo lige kun la mortigo
de Aleko Konstantinov estis devigita for-

ĝasi Sofion. La daŭrigo de la studado estis en Munkeno kaj Berno.

Kiel ĵurnalisto Stanĉev laboris komence en komerca ĵurnalo, poste en „Rabotniĉeska Borba“ (Laborista Batalo). Li sola eldonis la revuojn „Mlad Rabotnik“ (Juna Laboristo) kaj „Novo Obŝestvo“ (Nova Socio). En 1917 j. Stanĉev fondis la ĵurnalon „Kambana“ (Sonorilego). Dum la jaroj de la Unua Mondmilito li eldonis ĵ. „Balkanska Poŝta“ (Balkana Poŝto). Post la milito li longe estis ĉefredaktoro de ĵ. „Nezavisimost“ (Sendependeco) kaj ekde 1929 ĝis sia morto (18. V. 1944) — ĉefredaktoro de ĵ. „Zarja“ (Ciefrugo). Tiu progresiva ĉiutaga ĵurnalo fariĝis objektiva informilo por la laborista klaso, por la demokratiaj fortoj de nia popolo.

En ĵ. „Zarja“ Krâstju Stanĉev komencis ĉiusabate disponigi al E-informado tutan paĝon. En ĝi li aperigis novaĵojn el la E-vivo en Bulgario kaj eksterlando. Abundis informoj pri la vivo en Sovetunio, ricevataj pere de E-o. La E-paĝo en „Zarja“ aperadis en bulgara lingvo kaj multe kontribuis por popularigo de la Internacia Lingvo en nia lando. Pro ĝi la popola ĵurnalisto Krâstju Stanĉev por ĉiam ligis sian nomon kun Esperanto. La bulgaraj e-istoj estime kaj ame rememoras la nomon de tiu amiko de la lingvo de la paco kaj internacia amikeco.

Kosta Konstantinov

100-jariĝo de Sofio kiel ĉefurbo

Akad. VI. Topenĉarov

SOFIO — LA KORO DE BULGARIO

Antaŭ cent jaroj la Fonda Popola Parlamento de ĵus liberigita Bulgario kunsidis en Veliko Târnovo, la malnova ĉefurbo de Bulgario, kaj elektis por ĉefurbo Sofion. La ekonomia signifo de tiu sepmiljara urbo kaj ĝia centra loko en la bulgara etna komunaro antaŭdestinis ĝian estonton kiel nuntempa ĉefurbo. „Koro de Bulgario“ — tiel nomis Sofion Georgi Rakovski en letero jam en la mezo de la pasinta jarcento. Rakovski vidis malproksimen.

La malnova ĉefurbo Târnovo estis en la pasinteco. En la pasinteco estis ankaŭ Preslav. Ili apartenis al la Mezepoko, kiu starigadis siajn centrojn en malfacile alireblaj lokoj kaj ĉirkaŭis ilin per altaj muregoj. La nova tempo de Bulgario direktiĝis al ekonomia disvolviĝo, al vasta komerca agado kaj internaciaj ligoj, tial ĝi malfermiĝis al la mondo. La partoprenantoj en la naciliberiga batalo, kiuj kunsidis en la

Fonda Parlamento kiel leĝdonantoj, agis ne pro sentimentaleco al la historiaj tradicioj, sed pro realismaj konsideroj. Ili elektis Sofion, kiel ĉefurbon, kaj Sofio pravigis ilian elekton.

Centro de la bulgara ekonomia disvolviĝo kaj de la laborista klaso, Solio fariĝis centro ankaŭ de la revolucia movado, kiu finkondukis Bulgarian al la hodiaŭaj tagoj. Ĉi tie, en Sofio, aperis la unua revuo de la revolucia marksisma penso en nia lando — „Sâvremenen Pokazatel“ (Nuntempa Indikilo), redaktata de Dimitro Blagoev. La Oka Kongreso de la Bulgara Laborista Partio — revolucia kaj marksisma — fiksas „...kiel sidejon de CK de la partio Sofion“. Tiel jam preskaŭ la sekvan tagon post la nacia liberigo la jarcento de la ĉefurbo komenciĝis per batalo por liberigo de la homo el ekspluatado de la homo kaj por lia socialisma estonteco.

Sofio — centro de la revolucia komunisma penso kaj de la revolucia agado staras dum sia jarcento kiel sinonimo de la strebado al popola libero.

Direktu rigardon al la fasadoj, sur kiuj kiel medalionoj de la historio staras memortabuloj: ili notas la heroaĵon de la viktimoj kaj la transiron el la pasinteco al la socialismo. Kaj marŝas Sofio al nova kreado. Dum la 35 socialismaj jaroj de sia jarcento ĝi kreskas (en la plej strikta senco de la vorto) prudente — kreskas kun cemento, kun novaj blankaj kvartaloj, kun sciencaj kabinetoj kaj institucioj, kun universitataj haloj kaj laboratorioj, kun industriaj korpusoj kaj elektronaj establoj. Kaj antaŭ ĉio — kun humana panso pri la homo.

Laŭ nomo Sofio signifas „saĝecon“. Sed apenaŭ nun en sia multjara historio Sofio pravigis sian nomon. Ĝi atingis reale ĝis la saĝeco de la tempo pro siaj socialismaj ŝanĝoj.


Kaj pulsas kun ilia ritmo la nuntempa ĉefurbo Sofio — la koro de Bulgario!

El la centro de Sofio. En la fundo — la Patria Domo



**VASIL PETLEŜKOV — HEROO KAJ MARTIRO
DE LA BULGARA POPOLO**

Petleŝkov estas unu el la plej elstaraj figuroj de la naciliberiga batalo de la bulgara popolo kontraŭ la nigra kvincentjara otomana jugo.



Li naskiĝis en la urbeto Bracigovo je la 14a de januaro 1845 en la familio de malriĉa sapofaristo Najden Velĉev. Apenaŭ kvinjara li restis orfo — mortis la patro. La patrino edziniĝis duafoje al Angel Petleŝkov, tiel en la historio ŝia ido restis sub la nomo Vasil Petleŝkov.

Grandan influon por la edukado de la nature saĝa, spirite vigla kaj sciamaj junulo havis la popola instruisto Enjo Bekirski kaj la aperanta tiutempe literaturo kaj gazetaro. En 1874 li disponigis la supran etaĝon de sia domo por popola legejo. Kune kun d-ro Sokolski el Peruŝtica li finis 100-tagajn medicinajn kursojn en Istambulo. Do, li havis eblecon vidi la putriĝon de la koro mem de la otomana imperio.

Kiam je la 22a de februaro 1876 Benkovski venis kaj fondis revolucionan komitaton en Bracigovo, Petleŝkov, bone konata al li, estiĝis ĝia prezidanto. Li organizis la batalfortojn de la liberamaj bracigovanoj, ĉirkaŭiris la najbarajn vilaĝojn kaj ĉie fondis revolucionajn komitatojn. Oni febre komencis prepari sin por ribelo. La instruistino Ana Gizdova kudris standardon. Ĉiuj streĉe atendis la tagon. . .

En aprilo Petleŝkov partoprenis la unuan popolkunvenon (eksterleĝan) en Oboriŝte. Li la unua subskribis la plenrajtigon de Benkovski kaj tiel decide kontribuis por la unuigo de ĉiuj ĉeestantoj. Kiel sciante, pro pluvego oni ne povis resti en Oboriŝte kaj prepari la dokumentojn pri la ribelo, tial estis elektita komisiono, kiu prizorgu tiun aferon en Panagjuriŝte. Frunte al la komisiono ekstaris Petleŝkov. Li subskribis la protokolon pri la ribelo kaj alvokon al la bulgara popolo. La eksplodo de la ribelo trafis lin en Panagjuriŝte. Li prenis kun si kelkajn proklamilojn, subskribitajn per sango, kaj rapide forveturis al Bracigovo. Tie li ĵetis la malŝatatan fezon, surmetis la revolucionan vestaĵon, kroĉis je la zono du pistolojn, prenis ankaŭ sian fusilon „Ŝaspo“ kaj ekstaris frunte al siaj samurbanoj, same armitaj. La ĝojo kaj la entuziasmo estis senlimaj. . .

— Ribelon! Ribelon! Al armilo, fratoj! Koprivŝtica, Klisura kaj Panagjuriŝte jam leviĝis. Venis ankaŭ nia vico! Al armilo, fratoj!

Liaj vortoj perdiĝis en komuna ĝojo, pafado, jubilaj krioj. Kiam la amaso trankviliĝis, li eligis proklamon kaj komencis legi per tremanta,

potenca voĉo. Denove jubilo, brakumado. Komuna ebriiĝo de la libero. La loĝantaro el la ĉirkaŭaj vilaĝoj estis kolektita en la urbeto, oni komencis konstrui fortikaĵojn. La 27an de aprilo kun aparta soleneco oni elprovis la artilerion de Brăcigovo, konsistantan el ses ĉeriztrunkaj kanonoj. Ekbatis ĉies koro: jam estis preta forta armilo kontraŭ la malamata tirano! Ekde la 30a de aprilo ĝis la 6a de majo — heroaj, pezaj bataloj kontraŭ multnombra, bone armita malamiko. Petleŝkov kaj liaj fidelaj kamaradoj Angeliev, Bojanov, Arnau-dov kaj Lazar Iliev estis ĉie — ili batalis, helpis, kuraĝigis, ordonis. Sed venis novaj kaj novaj malamikoj. Kune kun la neregula armeo (baŝibozuko) alvenis ankaŭ Ahmed Barutanlia kaj Raŝid paŝao — la ekzekutintoj de Batak kaj Peruŝtica, Hasan paŝao — la venkinto ĉe Eleĝik.

Tiu lasta konsentis ne detrui la urbeton kaj ne mortigi la loĝantaron, se la ribelintoj transdonus sian armilaron kaj la ĉefgvidanton Petleŝkov. Amikoj admonis la bravulon forkuri, kaŝi sin, sed la nobla homo decidis kategorie: „Ne! Pli bone, se mortus unu homo ol pereus la tuta urbo!“ Li adiaŭis siajn proksimulojn, englutis venenon kaj trankvile sin donis en la manojn de la malamiko.

La turkoj bruligis du lignoamasojn kaj starigis Petleŝkov inter ili. Fajrolangoj kaj fumo ĉirkaŭvolvis la martiron, sed li nek krion, nek ĝemon eligis. Perforte oni venigis la loĝantaron por spekti la teruran bildon.

Hasan-paŝao donis signon, ke oni ĉesigu la torturadon.

— Kiu iris al Panagjuriŝte? — demandis Hasan-paŝao.

— Mi.

— Kiu ĉesigis la laboron de la loĝantoj? Kiu levis ilin kontraŭ la padiŝako?

— Mi, paŝao. Se iu kulpas, tio estas mi. La loĝantaro ne havas kulpon.

— Kiuj estas viaj kunuloj?

— Mi solas, aliaj ne estas! Mi gvidis, mi ordonis, aliajn ne serĉu!

Kolerigita de la kuraĝaj respondoj, la paŝao ordonis, ke oni denove starigu la junulon inter la fajrujoj. La langoj lekis lian vizaĝon, la nudan bruston, la manojn, bruligis la vestaĵon. La popolamaso proteste kaj kolere ekmoviĝis al la brulŝtiparoj, sed la soldatoj krude forpuŝis ĝin per la bajonetoj.

Hasan-paŝao vidis, ke la situacio fariĝas streĉa. Li ordonis, ke oni eltiru la bulgaron el la fajro kaj fortrenu lin al Pazarĝik¹, al tribunalo.

Jam kun nerekoneble difektita vizaĝo, senfortigita, Petleŝkov lastpove ekkriis kontraŭ la vizaĝo de la ekzekutistoj:

— Mi mortos, sed ankaŭ via regno longe ne vivos!

Du turkaj soldatoj kaptis lin subbrake kaj komencis treni lin. La popolo genufleksis, demetis la ĉapojn kaj kun larmoj lastfoje adiaŭis sian vojevodon.

Survoje al Pazarĝik, ekster Brăcigovo, apud la „Malbenita arbo“ Petleŝkov perdis la lastajn fortojn kaj falis. Kelkaj turkaj bajonetoj trapikis lin.

Nun sur tiu loko staras modesta monumento, kiu parolas:

„Bulgaro, por via libero ĉi tie la 8an de majo 1876 ellasis lastan spiron Vasil Angelov Petleŝkov.“

La heroan morton de Petleŝkov plej bone karakterizas Zahaŝari Stojanov.² „Kial vi, fraĉjo, ne estis naskita antaŭ ducent aŭ almenaŭ cent jaroj? Se via martira morto, kian suferis nek lia moŝto Simeon, nek Maria el Egiptujo okazis en tiu tempo... vi estus la unua inter la sanktuloj...“

¹ Pazarĝik — administra centro de tiu regiono.

² Z. Stojanov — la plej bona kronikisto de la Aprila Ribelo 1876, mem partopreninta ĝin.

„FAJRERO“, DUSPAT — 253 ABONOJN POR BE!

En sia mallonga historio E-societo „Fajrero“ en la rodopa urbeto Duspát atingis plej grandan nombron de abonoj al nia amata revuo „Bulgara Esperantisto“. Ni fieras pri ĝi!

Sed tiu ĉi sukceso estas rezulto de grandega laboro. Tutan monaton antaŭ la fino de la abonkampanjo la societa estraro preskaŭ ĉiutage kontrolis la marŝon de la varbado. La tasko, kiun ni starigis antaŭ ni, estis: „Ĉiu esperantisto en Duspát — abonanto de „BE“!“

Ni inde plenumis tiun taskon!

Velurina Ĉirpanska

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Sofia. La Studenta E-societo „Vela Peeva“ organizis en la Universitato solenan kunvenon dediĉe al SIA. Tre interesan prelegon faris prof. d-ro Stojan Ĝuĝev—membro de la Akademio de E-o.

Sekvis projekciado de koloraj diapozitivaj pri „Islando — lando de la kontrastoj“ fare de Mihail Sekerĝiev.

Morjana Vâleva

Trojan. La kunvenon de E-societo „Balkana Stelo“, dediĉita al SIA, partoprenis ankaŭ nee-istoj. Pri E-o kiel rimedo por forigo de la lingva bariero inter la popoloj parolis Penka Mitovska. Ŝi substrekis la respondecan devon de la e-istoj pri firmigo de la internacia amikeco kaj pacosur la tero. La publiko aprobis telegramon proteste al la ĉina agreso kontraŭ Vjetnamio.

Al ĉiuj ĉeestantoj estis donacitaj elegantaj blankaj poŝtuketoj kun stampita terglobo kaj figuroj el diversaj rasoj kaj la devizo „Amikeco trans limoj“.

Stiljana Kavrâkova

E-jubileo en Bankja

E-societo „Solidareco“ en u. Bankja kune kun la loĝantoj de la tiea strato „Esperanto“ organizis la 16an de marto printempan koncerton lige kun la 45-jara jubileo de la societo. Ĉeestis ĉ. 300 personoj. Estis prezentita riĉa muzikprogramo, en kiu Neli Borisova majstre plenumis la ŝatatajn „Ho, mia kor!“ kaj „La vojo“ de Zamenhof.

B. Atanasov

Literatura rondo en Burgas

Ĉe E-societo „Nigra Maro“ — Burgas, estis fondita literatura E-rondo, kiu ricevis la nomon „MEVO“. La rondo havas 11 membrojn. Kiel prezidanto estis elektita Serafim Serafimov, kiel sekretario — Elena Stojkova.

La rondo okazigas ĉiusemajnajn kunvenojn. Ĝi akceptis agadplanon, en kiu estas antaŭvidita kunlaborado al „Bulgara Esperantisto“, kontaktigoj kun literaturaj E-rondoj en eksterlando ka. Ĉirkaŭ la 20a de aŭgusto oni planas vesperon el la verkaro de la membroj, al kiu oni invitos gastojn el diversaj loĝlokoj kaj el la Internaciaj E-Kursoj en kv. Meden Rudnik, Burgas.

Elena Stojkova

Alta manifestigo de la internacia solidareco

Lige kun la jaro de Batalo kontraŭ la Apartismo en Sud-Afriko dekoj da E-societoj en nia lando organizis kunvenojn. Oni prenis protestajn resoluciojn kontraŭ la apartismo — tiu honta anakronismo por la nuntempa homaro, kiu tiel nigre floras en

(sur p. 9)



Emil Ĉirpanski — prezidanto de „Fajrero“ en Duspát, kaj lia edzino V. Ĉirpanska, estrarinino, ĉefaj organizantoj de la abonkampanjo de „BE“.

JUNULARA E-KONFERENCO EN VARNO

La 10an de marto en Varno okazis granda ernkontiĝo de la nordbulgara E-junularo (ĉ. 120 homoj!), kiun partoprenis ankaŭ 30-membra grupo el Sofio.

La 10an, sabate vespere, estis gala interkona vesperamuzo en la Distrikta junulara Domo. La 11an antaŭtagmeze tie okazis konferenco. Paroladon pri E-o kaj la bulgara junularo faris k-do Kunĉo Vâlev — sekretario de BEA. Pri la antaŭstaranta balotoj por popolaj sovetoj parolis Mariana Elenova, studentino.

La ĉeestantojn salutis reprezentantoj de diversaj junularaj E-grupoj el Norda Bulgario. En la nomo de la eksterlandaj studentoj e-istoj en Varno salutis prezentis Mia Mohamed Oares Ali en Bangladeŝo.

Pri siaj spertoj en la E-laboro parolis ĉiuj amikoj el Varno, Ŝumen, Târgoviște, Pleven, Kubrat, Sofjo. La ĉeestantoj apro-

(El p. 8)

Sud-Afriko. Sub la rezolucioj la ĉeestantaj e-istoj metis siajn subskribojn.

La mapoj kun la rezolucioj kaj la pli ol 2000 subskriboj estas transdonitaj al la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto. Tiu dokumentaro estos uzita de la bulgaraj reprezentantoj en UNO por ilustri ankaŭ la rilaton de la bulgaraj e-istoj al la apartismo.

Plej multe da subskriboj estas kolektitaj en Varno (379), Pleven — 169, Stara Zagora — 169, Vidin — 137, Sofio — 137, Polski Trâmbeŝ — 135 ka.

El la junulara E-konferenco en Varno:

1. Parolas reprezentanto de Ŝumen
2. Salutas Ali el Bangladeŝ

Fotoj: L. Nikov



Niaj amikoj pri ni

Izabela Ofiuniene,

Kretinga, Litovio

LA REVOJ EFEKTIVIGIS. . .


Post la gastado ĉe miaj amikoj en Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj GDR mian atenton altiris la suna lando Bulgario. Mi ekdeziris nepre vidi ankaŭ ĝin. Multajn jarojn mi revis pri tio. . . Foresto mi konatiĝis kun ĉarmaj lokoj de ĝia naturo pere de bildkarto, libroj, rakontoj kaj priskriboj de miaj bulgaraj amikoj Minko Conkovski, Dimo Dimov ka.

Kaj jen mi povas konstati: mi ne seniluziĝis! Belega estas Bulgario! Vere vidinda! Unue mi petas la bulgarajn amikojn pruntedoni al mi, baltlandanoj, iom da suno! Vere riĉa je mirakloj de la naturo estas la bulgara tero! Mi dezirus piede trapaŝi ĉiujn ŝtonozajn senakvaj riveretojn, ĉiujn montojn kun diversformaj rokoj kaj timigaj abismoj, ĉiujn grotojn kun nekompreneblaj naturaj kreaĵoj. . .

Multon mi ekvidis dank' al mia amiko Conkovski — vera turisto. Mi venkis montosuprojn de Vitoŝa kaj Maljovica, sed miaj piedoj rifuzis porti min malsupren. . . Tamen mi sentis min heroino post la venko! Ja miaj piedoj la tutan mian vivon nur tra ebenajo paŝas. . .

Ne al kutimiĝis mi ankaŭ al la subitaj ŝanĝoj de la temperaturo: ne kutima, ĉirkaŭ +34°, la varmeco ĉiutage igis min ŝviti kaj sur la montosuproj neĝo kaj malvarma vento vere esploris miajn fortojn — frostis miaj manoj kaj nazo, malgraŭ ke mi estis en varma vesto. Kun miro kaj envio mi rigardis la lokajn kaj eksterlandajn turistojn, grimpantajn al la montosuproj nur en bankostumoj. . .

Generale la bulgara suno kaj la freŝeoc de la monta aero efikis favore mian sanon.



Bone estus vivi en tiu lando, aŭ almenaŭ ĉiujare ripozi en ĝi! La lokoj, viditaj sur bildkartoj, reviviĝas, kiam vi vidas ilin per propraj okuloj. Kaj la homoj! Unualoke impresis min la gastameco de la bulgaroj. Poste — ilia obstino kaj preteco batali por siaj rajtoj. Ŝajne ili ne bezonas milicon: la popolo mem faras la ordon inter si. La bulgaroj ne restas indiferentaj, vidante apud si la malbonon. Al mi plaĉis, ke ili estas veraĵ mastroj de sia lando. Sur la stratoj ne kuraĝas aperi ebriuloj, huliganoj k. a., kiuj ŝatas sin montri kvazaŭ reprezentantoj de supernova mondo. Aparte la bulgarinoj ofte altiris mian atenton. . . Kaj la infanoj, tiel bele vestitaj, mallonge tonditaj, kiel pupetoj. . . ĉiupaŝe min ĝojigis. Mi ne vidis senprizorgajn infanojn aŭ gejunulojn, amasiĝintajn en iu placeto kaj maldece petolantajn: evidente gepatroj, lernejo kaj socio bone edukas la junularon.

Mi ĝojis, ke sur la vizaĝoj de la bulgaroj brilas ridetoj, gajo kaj feliĉo. Tiuj vizaĝoj mem parolas: „En nia socialisma patrolando ni vivas bone, feliĉe, sate, ne konante la mizeron!“. Mi provis eĉ provoki: „Preskaŭ ĉie mi vidas nudajn montojn, rokojn, tio estas nur por anima ĝojo kaj ĝuo, sed kie estas via nigra tero, kiu naskas al vi la panon?“ Tamen mi mem, travivinte en Bulgario 40 tagojn, konvinkiĝis, ke la pano al bulgaroj tute ne mankas: mi ĉie ĉiam estis gastigata per bonega blanka pano! Kaj ĝi sufiĉas ne nur por la bulgara popolo, sed

ankaŭ por la multnombraj turistoj, ĉiujare amase vizitantaj tiun ĉi pitoreskan, allogan landon.

Bonegajn impresojn lasis ĉe mi la renkontigoj kun sofiaj e-istoj: aktvuloj, ardantaj, sindonemaj al la E-movado kiel Nikola Aleksiev, Kunĉo Vălev, Krâstju Karucin, la kantistinoj de la Sofia E-ĥoro kaj nepre ilia ĥorgvidanto. Tio vere min inspiris neniam ĉesi labori por E-o. Oni ne rajtas forgesi la e-istojn de Smoljan, kiuj pro sia aktiveco kaj sindonemo meritis la estimon de la ŝtatestroj kaj ricevis monrimedojn de la ŝtato por konstrui grandan modernan kvinetaĝan domon-palacon por E-kursoj. Tie kolektiĝos homoj el multaj landoj por lerni la lingvon de la paco kaj la internacia amikeco. Videble, multajn E-aktivulojn havas Bulgario! Kiom multe ili faris, por ke E-o estu tiel disvastigita en la tuta lando! „Esperanto—lingvo de paco kaj amikeco inter la popoloj!“ — tiu frazo en Bulgario estas ne nur slogano, sed viva ideo, helpanta gardi la pacon en la tuta mondo. Tion pruvis ankaŭ la majesta 63a UK de E-o en Varno.

Longe mi gastis en Bulgario kaj multon mi vidis, sed multo ankaŭ restis nevidita. Tial ĉe la forveturo mi diris ne „adiaŭ!“, sed „Ĝis revido!“ Kaj mi nepre ankoraŭfoje revenos, por denove elprovi miajn fortojn atakante la montosuprojn. . . Por bone ekkoni tiun ĉarman landon, estas necese viziti ĝin multfoje.

TRA LA E★ MONDO

AKTIVA ESPERANTO-AGADO EN GDR

La ĵurnalisto Coĉo Kolarov — vicprezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Loveĉ, partoprenis la IIIan Centran Renkontiĝon de la Esperantistoj en Kulturligo de GDR, kiu okazis je la 13—15 de oktobro 1978 en Rostock, ĉe la Balta Maro. Utiligante la eblecojn, li starigis al la sekretario de Centra Laborrondo Esperanto, d-ro Detlev Blanke, kelkajn demandojn.

Demando: *Kiel vi pritaksas la ĝisnuraĵajn sukcesojn de la e-istoj en GDR?*


Respondo: La e-istoj en GDR laboras ekde 1965 organizite en la socialisma kultura amasorganizaĵo „Kulturligo de GDR“. Ili estas parto de tiu altprestiga organizaĵo, kiu eĉ havas proprajn mandatojn en la Popola Parlamento de GDR. La specifaĵo do estas, ke en nia lando la e-istoj estas parto de neesperantista organizaĵo. Tio kreas principe bonajn eblecojn de efika integriĝo de la E-agado en la socion kaj evitigas izoligon. La gvidantaro, komparebla kun la centra estraro de BEA, nomiĝas „Centra

Laborrondo de Esperanto“ (CLE) kaj konsistas el 37 membroj. La prezidanto, post la morto de nia neforgesebla Rudi Graetz estas Rudolf Hahlbohm. CLE gvidas la agadon de la e-istoj, prenas decidojn aŭ rekomendojn kaj reprezentas la Movadon en eksterlando. La prezidio de CLE konsistas el 8 personoj.

La celoj de nia agado, specifaj por la Kulturligo, i. a. estas: 1. utiligi E-on por la elformiĝo de socialismaj personecoj kaj por interesa kulturplena aktivado; 2. utiligi E-on por la diskonatigo de la atingoj de GDR; 3. kontribui al la porpaca batalo, al la internacia amikeco kaj kulturinter-

ŝanĝo; 4. disvastigante E-on kaj ties aplikon, kontribui al la plifaciligado de la internacia lingva komunikado kaj konsciigi pri la lingva problemo.

Nuntempe funkcias distriktaj kaj subdistriktaj laborrondoj en ĉiuj 15 distriktoj de nia lando kaj en ĉ. 100 grupoj kaj kursoj.



La e-istoj de GDR kunlaboras en MEM, UEA, TEJO kaj flegas intensivajn rilatojn kun ĉiuj socialismaj landoj kaj kun e-istoj el aliaj landoj.

Ni observas malrapidan mezan plijuniĝon de nia membraro, sed ni ankoraŭ devas multon fari por atingi pli da junaj membroj.

Ĝis nun ni pretigis la plej bazajn instrumaterialojn. Aperis ekzemple de E. D. Krause poŝvortaroj Esperanta-Germana kaj Germana-Esperanta en kelkaj eldonoj. En preparo troviĝas ampleksaj vortaroj. Komence de la kuranta jaro aperis la dua lernolibro (post tiu de Ludwig Schödl) en la ŝtata eldonejo Enzyklopädie-Verlag Leipzig. Krome ni presis specialajn helpmaterialojn por kursgvidantoj kaj por memlernantoj.

Ni eldonas ekde 1965, do jam en la 15a jaro, nian modestan revueton „der esperantist“ kun nun entute pli ol 90 numeroj (ĉiu numero 24-paĝa). Aperis diversaj fakaj materialoj (gramatiko, kanto-kajeroj, artikolaro pri E-o, varbiloj ks.). Menciindas ankaŭ la tri beletraĵoj aperigitaj en la periodo 1974—1978 en la ŝtata eldonejo Edition Leipzig: „Nuda inter lupoj“ de B. Apitz, „Trigroŝa Romano“ de B. Brecht kaj „La perditita honoro de iu Katarina Blum“ de Heinrich Böll. Ekde 1966 ĉiujare aperas 40-paĝa GDR-numero de „Paco“ (do entute jam 13 numeroj). Krome ni kunlaboris en la eldonado de informbroŝuroj pri GDR (entute 6) kaj en la sinkronigo de 4 koloraj informfilmoj. Ĉiujare aperas 100—200 arti-

koloj en la taga gazetaro. La tendenco estas forte pozitiva.

Multon ni faris por eduki politike kaj fake niajn kadrojn, funkciulojn. Ĝis nun ni organizis ĉ. 20 diversajn tutsemajnajn seminariojn kaj ĉ. 30 plurtagajn por tiu celo.

Ce CLE laboras fakgrupoj: interlingvistiko (esperantologio), metodiko de E-instruado, fervojistoj, medicinistoj, Junulara Komisiono. Speciale menciindas la agado de la fakgrupo interlingvistiko, kiu certigis, ke inter sciencistaj rondoj de GDR E-o kaj la planlingva problemaro ne plu estas nekonata aŭ konsiderata fantaziaĵo. Konsiderindan laboron dum la lastaj jaroj ankaŭ faris la fakgrupo metodiko, pretigante la supre menciitajn instrumaterialojn.

Demando: Kiujn problemojn havas nun via Movado?

Respondo: Nu, la problemoj abundas. Konsiderante, ke ni laboras pli ol 14 jarojn, ni multon atingis kun relative malgranda aro da aktivuloj. Tamen samtempe ni scias pri gravaj mankoj. Malsame al Bulgario ekzemple ĉe ni ankoraŭ mankas sufiĉe da junaj e-istoj. Ni ne kontentas ankaŭ pri nia enlanda peresperanta turisma oferto por la eksterlando. Ĝis nun ni ne trovis la ĝustan materialan bazon por iniciati regule okazantajn internaciajn aranĝojn, daŭrantajn almenaŭ du semajnojn. Aŭ, trie, multe da tempo pasas por la preparo de instrumaterialoj kaj vortaroj. Bedaŭrinde ne sufiĉas la nombro de vere kompetentaj fakuloj ĉe ni. La malgranda profesia aparato, konsistanta entute (do por la tuta lando) el 3 plenpagitaj agantoj (unu el ili estas mi), ne sufiĉas por ĉiu necesa farenda laboro. Por ni ankaŭ tre gravos eduki pli multe da novaj kadroj, kiuj ne nur bone parolu la lingvon, sed ankaŭ bone orientiĝu en internacipolitikaj kaj fakaj aferoj.

Demando: Kiaj estas la estontaj taskoj antaŭ la E-movado en GDR?

Respondo: Ili doniĝas el miaj unuaj du respondoj. Por nia Movado pleje gravas plialtigi la politikan, lingvan kaj fakan nivelojn de ĉiuj e-istoj. Krome ni devas atingi pli amasan karakteron. Ni krome klopodas en la estonto atingi pli fortan influon en sciencistaj rondoj kaj plivastigi la E-instruadon, speciale en popolaj altlernejoj. Nuntempe ni iom esploras la kompleksan problemon de la personecformaj kaj edukaj valoroj de E-o, por tiri el tio konkludojn por la estonta agado. Krome ni devas multe pli intensigi niajn internaciajn aktivecojn, la eldonagadon ktp. Do vi vidas, ke la taskoj multas.

Demando: Kian impreson vi havas pri la kontaktoj inter la bulgaraj e-istoj kaj la e-istoj de GDR, respektive inter ambaŭ asocioj?

Respondo: La agado de la bulgaraj e-istoj en nia lando havas tre bonan reputacion. Ekzistas multaj amikaj personaj rilatoj. La oficialaj rilatoj inter BEA kaj CLE estas bonegaj.

Mi devas substreki, ke jam dum la dudekaj jaroj germanaj laboristaj e-istoj, ekzemple Otto Bässler el Leipzig, intime kunlaboris kun revoluciaj bulgaraj e-istoj. Tiu tradicia fundamento, pliforĝita per la grava politika influo, kiun havis la heroa batalo de Georgi Dimitrov en 1933, efikas ĝis hodiaŭ. La aktivuloj N. Aleksiev, A. Grigorov, Hr. Gorov, St. Kostadinov ka., por menciigi nur kelkajn, el la iama BuLEA, ĉe ni estas alte taksataj kaj tre estimataj. Lastatempe ni kun ĝojo vidas plikonkretiĝon de niaj rilatoj je grupa ebena. Tiel ekevoluis ekzemple rektaj esperantistaj rilatoj inter

Magdebur — Ŝumen kaj Leipzig—Plovdiv. Ni ĝojus, se tiuj rilatoj plimultiĝus.

Gravegan antaŭenpuŝon al niaj amikecaj internaciismaj rilatoj sendube donis la giganta 63a UK de E-o en Varno, kiun el GDR partoprenis pli ol 100 e-istoj. Tio faris grandan impreson al niaj e-istoj kaj ankaŭ kontribuis tre efike al la establo de novaj bulgaraj-germanaj interrilatoj pere de E-o.

Demando: *Kion vi bondezirus al la bulgaraj e-istoj?*

Respondo: Mi deziras al la bulgaraj e-istoj pluajn sukcesojn en ilia agado, kontenton kaj ĝojon.

Samtempe mi esprimas mian certecon, ke la bonaj rilatoj inter niaj du socialismaj landoj ankaŭ pere de E-o estonte ankoraŭ pli profundigos.

Intervjuinto: Coĉo Kolarov

NEKUTIMA JUBILEO

Ĝuste antaŭ 20 jaroj mi, kiel instruistino de biologio en popollernejo ĉe Porinfana Sanatorio en Gdansk, fininte E-kurson, decidis enkonduki tiun lingvon en la eksterprogramajn okupojn de la malsanaj infanoj. Mi organizis infanan E-rondeton, kun kies membroj dum la ĉiusemajnaj okupoj mi faris normalajn lecionojn de E-o, verkis leterojn al amikaj e-istoj eksterlande, legis kaj tradukis ricevitaĵojn de ili leterojn kaj preparis albumojn pri nia urbo kaj lando. Ne estis ebla instrui la fundamenton de la lingvo ĝisfine, ĉar la infanoj estis kaj estas kuracataj en la sanatorio dum 3—4—6 monatoj, nur malofte tutan jaron. Tamen ili multon aŭdis pri la E-movado, iomete parolis kaj de tempo al tempo kontaktiĝis kun e-istoj. Ili ĉiam elportadis el la sanatorio pozitivan scion pri E-o kaj ofte daŭrigis la lernadon en junularaj kulturdomoj aŭ en la lernejoj, kie E-o estas instruata.

En nia korespondado regis la Sullivana sistemo de Geonkloj Esperantistaj, pro kio kelkaj geonkloj ĝis hodiaŭ interesiĝas pri la

rondeto, korespondas daŭre, interŝanĝas ne nur leterojn, sed ankaŭ amikajn donacetojn. Ĉar ĉio-ĉi restas en la lernejo, dum 20 jaroj amasiĝis granda kolekto de valoraj ekspozicieblaj objektoj, kiuj vekas la intereson de ĉiuj lernejoj kaj de la lerneja stabo, helpante ofte eĉ kiel instruiloj por instruistinoj de geografio, historio, biologio ktp.

Kelkaj Geonkloj, hazarde aŭ speciale estante en Gdansk, vizitis la lernejon kaj kontaktiĝis kun la rondetanoj. Aliaj konstante kaj fidele daŭrigas kun ni la korespondadon, preskaŭ ekde la fondiĝo de la rondeto.

For de siaj hejmoj, vivantaj en fremda medio, inter fremdaj homoj en blankaj kostumoj, la infanoj trovis en la rondeto novan, frapantan interesiĝon, ĝojon kaj ripozon for de la sanatoriaj ĉiutagaĵoj. Tio mobilizis iliajn fortojn kaj imunecon en la batalo kontraŭ la malsano. Pro tio, en la nomo de miaj lernantoj kaj iliaj familianoj, en la nomo de la sanatoriaj kuracistoj mi tutkore dankas al ĉiuj, kiuj tiom longe, bonvoleme, pacience kaj seninterrompe helpis al ni, helpas kaj — mi kredas — longe ankoraŭ helpos.

La jubilea solenaĵo de la rondeto okazos en majo. Estus feliĉege por ni, se la bonvolemaj e-istoj nun, en la Internacia Jaro de la Infano, pligrandigus la ĝojon de niaj infanoj, sendante okaze de la jubileo gratulojn kaj bondezirojn. Tio tutcerte helpas ankaŭ al mi en la kontinuada de mia poresperanta laboro en la sanatoria lernejo. La adreso: Infana Esperanto-Rondeto en la sanatoria lernejo, str. Polanki 119, PL 80, 308 Gdansk, Pollando.

Mi anticipe dankas al ĉiuj, kiuj akribos!

Janina Pieróg



En sia ampleksa studo „Lenin kaj Esperanto“, publikita en revuo „der esperantist“ n-ro 42/1970, represita en n-roj 11 kaj 12/1970 de „Bulgara Esperantisto“, doc. S. N. Podkaminer el Leningrado, montrante kiel duan fonton, el kiu venas sciigoj pri eldiroj de Lenin rilate Esperanton, referencas al la rememoroj de la konata ĉeĥa esperantisto prof. Miloš Lukaš, publikitaj en revuo „Esperantisto Slovaka“, n-ro 34/1950 sub titolo „Esperanto — la lingvo de la tutmonda laboristaro“.

En sia artikolo prof. Lukaš rememoras, ke en la jaro 1920 li intervjuis la tiaman ĉefon de la soveta misio en Prago, d-ro Hillerson, en la ĉeesto de la tradukisto Simon Elioviĉ el Harkov. Hillerson asertis, ke li multfoje pridiskutis kun Lenin la problemon de lingvo internacia, kaj ke Lenin nomis Esperanton „lingvo de la proletaro“.

Substrekante la gravecon de tiu ĉi indiko de Hillerson, S. N. Podkaminer sciigas, ke „bedaŭrinde, ĝis nun estis neeble trovi iujn postsignojn de tiu Hillerson“, kaj konkludas, ke „aperas grava tasko por la polaj, ĉeĥoslovakaj, moskvaj kaj ukrainaj esperantistoj daŭrigi siajn serĉojn por ricevi finfine klaran bildon pri la problemo, kaj publikigi la rezultojn de ilia komuna laboro“.

Reeĥe al la alvoko de doc. Podkaminer la ĉeĥa esperantisto Jaroslav Marĵik en Prago entreprenis serĉojn por pruvi la ekziston de d-ro Hillerson (aŭ Gillerson, laŭ la rusa transskribo). En n-ro 4/1978 de „der esperantist“ li publikigis la rezultojn de siaj serĉoj sub titolo „La ekzisto de d-ro Hillerson pruvita“.

S-ano Marĵik sciigas, ke laŭ lia peto la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj kaj la Ĉeĥoslovaka-Soveta Instituto en Prago informis lin per letero en februaro 1976 pere de la sindikata ĵurnalo „Prace“, ke d-ro Hillerson laboris en Prago de la 10a de junio 1920 ĝis la somero de 1921 kiel ĉefo de la soveta repatruiĝa misio de la Ruĝa Kruco, perante interŝanĝon de militkaptitoj. La misio, fakte, estis la unua soveta reprezentantaro en Ĉeĥoslovakio kun rajtoj de eksterteritorieco kaj esprimo de agnosko „de facto“ pri la soveta ŝtato. La instituto informis, ke vico da sovetaĵaj materialoj pravas, ke Hillerson kunlaboris al Lenin en la tempo de politika elmigranteco, kaj ke „ne estas ekskludite, ke en la jaro 1921 li estis en Krakovo kaj interrilatis kun V. I. Lenin“. La instituto donis la titolojn de du prihistoriaj verkoj, eldonitaj en Prago en 1975 j., en kiuj oni povas trovi respondojn al demandoj pri Hillerson: a) Dokumentoj kaj materialoj koncerne la historion de la ĉeĥoslovakaj-sovetaj rilatoj en

1917—1977; b) Resuma historio de la ĉeĥoslovakaj-sovetaj rilatoj 1917—1939, en kiuj Hillerson estas citita multfoje.

El la cititaj materialoj evidentiĝas, ke: 1) D-ro S. I. Hillerson efektive vivis; 2) Okazis kunlaboro inter d-ro Hillerson kaj V. I. Lenin eĉ en tia grado, ke 3) D-ro Hillerson reprezentis en Ĉeĥoslovakio en 1920—21 jaroj la junan sovetan ŝtaton en sufiĉe grava ŝtata funkcio.

En la fino de sia komunikaĵo s-ano Marĵik esprimas sian neŝanceleblan fidon al prof. Lukaš, sed aldonas, ke ĝi ne povas esti pruvo pri la vereco de tio, kion Hillerson diris al li.

Traleĝinte la komunikaĵon de J. Marĵik mi kontrolis, ĉu estas donitaĵoj pri d-ro Hillerson en la Plena Kolekto de la verkoj de Lenin kaj trovis jenon:

En la nomindikilo de la dua parto de la Referenca Volumo al la kvina ruslingva eldono de la Plena Kolekto sur p. 428 troviĝas la nomo Gillerson S. I. kun ununura referenco al vol. 51 de la PK. En ĉi lasta volumo, eldonita en 1965 j. sur p. 287 estas publikita sub n-ro 515 letero de Lenin de la 25a de septembro 1920 al Gillerson, Prago, kiu tekstas jene:

„Publiku senprokraste en la gazetaro kaj sciigu al la Kongreso de la Ĉeĥoslovaka Socialdemokrata Partio, ke la referenco de Franc Beneš pri ŝafne okazinta interparolo kun mi pri la ebleco aŭ malebleco de proletara diktaturo en Ĉeĥoslovakio, estas ekde la komenco ĝis la fino mensogo kaj ke mi ne nur ne interparolis kun li, sed eĉ ne vidis lin. Kompreneble, mia opinio pri Bela Kun kaj pri la Hungara Revolucio, referencita de la sama Beneš, estas same tiel abomena mensogo.“

En la nomindikilo de volumo 51 sur p. 490 lige kun la supre citita letero estas donita jena noto pri d-ro Hillerson:

„Gillerson, S. I. (naskita 1869) — estis membro de la Partio ekde 1919 j. ĝis 1924 j. En 1920—1921 j. li estis ĉefo de la misio de la Soveta Ruĝa Kruco en Prago, kiu okupiĝis pri repatruiĝo de la eksaj militkaptitoj el Ĉeĥoslovakio en Sovetan Rusion.“

La suprecititaj materialoj konfirmas la rezultojn de la serĉado de J. Marĵik. Krome, ili donas pliajn informojn pri d-ro Hillerson, nome pri lia naskiĝjaro, lia membreco en la Bolŝevista Partio kaj pri tio, ke li plenumis ankaŭ partiajn taskojn. Pluaj serĉoj povus alporti plenan klarigon de la problemo.

Dimitro Haĝiev

ĈU SAMAJ METODOJ POR ĈIUJ ?

Kun intereso mi legis la artikolon de d-ro Vilho Setälä en „der esperantist“ 83. Fakte ĝi estas bazita sur respondo al miaj metodikaj notoj publikitaj en antaŭaj kalendaroj de la sama gazeto. La aŭtoro asertas (tute prave!), ke „grandparte ili estas adaptitaj al la bezonoj de lernantoj, kies gepatra lingvo estas iu el la hindo-eŭropa familio“. Kompreneble! Mia difino estus eĉ pli kategoria: miaj notoj estas direktitaj precipe al bulgaraj E-instruistoj kaj pro tio ili estis publikitaj en revuo „Bulgara Esperantisto“, de kie estas represitaj en „der esperantist“. Mi estis surprizita kiam mi vidis ilin en la organo de la germanaj e-istoj. Plurloke mi turniĝas nome al bulgaraj e-istoj kaj parolas pri bulgaraj kondiĉoj (iuj el tiuj lokoj estas lasitaj en „der esperantist“, ekzemple sur pĝ. 9 de n-ro 76). Sed verŝajne la germanaj amikoj trovis lokojn, kiuj tute valide validas ankaŭ por ili kaj verŝajne, kiel asertas ankaŭ Setälä, por la tuta hindo-eŭropa familio, t. e. preskaŭ por la tuta Eŭropa kontinento, kaj konsideris utila ilin represi. Mi aldonus: iuj el miaj notoj validas por ĉiu ajn nacio.

El la ĉi-supra diritaĵo sekvas, ke unu sama „fiksita“ metodo ne povas validi por ĉiuj okazoj, des pli — por ĉiuj nacioj. Mi ĉeestis en Pollando seminarion de korespondakurso. Unu el la bazaj diskutataj demandoj estis la uzo de la difina artikolo. Estis klare, ke tiu punkto de la gramatiko estas malfacile komprenata de la lernantoj. Nature, ĉar en la pola lingvo ĝi mankas. Kontraŭe, por bulgaroj ĝi ne estas problemo, kvankam ili uzas ĝin pli ofte ol la logiko postulas tion. Tamen por la bulgaroj malfacilan lokon prezentas la akuzativo, kio ne validas por la rusoj kaj la germanoj. Jen la diferenco. E-lektoro, instruanta al bulgaroj, devas koncentri sian atenton al la instruado de akuzativo, al la poloj — de la artikolo, al la angloj — eble de la prononco, al la rusoj — de la uzo de la verbo „estas“ ktp.

Laŭ tradicio kaj imito de eksterlandaj E-instruistoj kaj lernolibroj, bulgaraj instruistoj instruas unue la akuzativon de la substantivo, poste de la adjektivo kaj fine de la persona pronomo. Tiu procedo eble estas taŭga por germanoj, poloj, rusoj ka. La bulgaroj tamen malfacile perceptas tiun akuzativon. Por ili natura vojo estas komenci per akuzativo de la persona pronomo, ĉar ĝi restis nura en la bulgara lingvo kaj la lernantoj ĝin perceptas kiel ion naturan. Poste la anstataŭigo de la personalo per substantivo estas jam pli facile komprenebla per la konvinko de la logiko. Tion mi eksplicite klarigas en la ĉi-supre menciitaj

notoj, emfazante tiumaniere, ke la metodo dependas de la aŭskultantaro, de ĝiaj lingva kaj kultura niveloj, de ĝia aĝo kaj — ne lastloke — de ĝia nacieco. (Bedaŭrinde ĝuste tiu ĉi ĉapitro — pri la instruado de la akuzativo — aperis en „der esperantist“ fuŝe: pro defalo de iuj tekstoj perdiĝis la logika ligo inter la frazoj kaj rezultis sensencaĵo).

El ĉio ĉi sekvas, ke la ekzemploj de konataj por la bulgaroj vortoj (studento, ĝeneralo, vino, romano. . .) devas esti anstataŭigitaj laŭ la postuloj de la nacia lingvo de la kursanoj. Memkompreneble, se ne ekzistas tiaj vortoj (egalaj en E-o kaj la koncerna nacia lingvo), oni ne devas uzi tiun metodon.

Tamen kion signifas la propono de d-ro Setälä: la regulon (pri komenco per konataj vortoj — *mia noto*) ni devas tute renversi — komenci per la plej ĉiutage bezonaj vortoj. Se ni absolutigus tion (kiel kategorie estas dirite en la nomita artikolo), ĝi transformiĝus en absurdaĵon. Evidente tiu propono validas ankaŭ nur por iuj nacioj. La plej feliĉa okazo estus, se ni povus kunigi la du principojn, t. e. komenci per ĉiutage bezonaj vortoj, kiuj laŭ formo kaj elparolo estas konataj al la kursanoj. Tio estus la ideala kazo.

Sed kion signifas „ĉiutage bezonaj vortoj“? Ĉu ili estas ĉiam la samaj? Certe ne! Ankaŭ tie ĉi influas la naciaj moroj, kutimoj, kulturo. Se la vorto „saŭno“ estas utila por la finnlanda instruisto, por la bulgara ĝi estas tute netaŭga, ĉar estas nekonata ne nur la vorto, sed ankaŭ la objekto. Certe ne samaj estas la „ĉiutage bezonaj vortoj“ pri kuirado, pri la aranĝo de ĉambroj, pri aĉetado, promeno sur la strato, eĉ pri lernejo. Eĉ en unu sama nacio ne en ĉiuj lokoj de la lando „la ĉiutage bezonaj vortoj“ estas la samaj. Tio precipe validas pri la lingvaĵo de la urbanoj kaj la vilaĝanoj.

Konklude. Absolutigo de reguloj ofte estas danĝera en la pedagogia kaj speciale en la metodika kampo. La bona E-pedagogo devas kree apliki la principojn. La precizigita metodo de instruado de diversaj partoj de la lingvo adaptiĝas al la konkreta okazo depende de diversaj faktoroj. Plej grava el ili estas la kursanaro: instruisteco, ĝenerala kulturo, lingva kulturo, aĝo, sekso, nacieco, profesio, personaj interesoj ktp. Aliajn faktorojn prezentas la kursejo, la moroj kaj la kutimoj en la koncerna landregiono, tiaj povas esti eĉ la klimataj apartaĵoj, la naturo, la konkreta pejzaĝo, la kutimaj okupoj de la loĝantaro ktp.

La demando estas komplika kaj la plej ĝusta konkretigo de la metodo dependas de la sperteco de la instruisto.



LA INFANA KANTO KAJ LA INTERNACIISMA EDUKADO

La muziko, simile al E-o, estas internacia lingvo por ĉiuj popoloj. La kantoj flugas, ŝvebas tra la ĉielvasto, transpasas la limojn kaj proksimigas la homojn. Ili tre efike helpas la lernadon. Oni scias, ke la unuaj lecionoj plej ofte komenciĝas per kantetoj.

Ekde deko da jaroj mi pristudas la problemon „La infana kanto kaj la edukado“. Per la internacia lingvo E-o mi interligiĝis kun multe da kolegoj-muzikistoj el diversaj landoj. Laŭ mia peto iuj sendis al mi lernolibrojn pri kantado kaj kantaretoj, precipe en nacia lingvo, aliaj sendis infankantojn ankaŭ en E-o. Tio ĉi estas bona ekzemplo pri internacia samideana kunlaborado. Mi uzas la okazon de tiu ĉi tribuno kore danki al ĉiuj kolegoj, kiuj reeĥis al mia peto. Dank'al ĉilia helpo mi kolektis centojn da infankantoj, kiujn mi zorgeme trastudis.

Jen mallonge kelkaj konkludoj kaj rekomendoj el miaj ĝisnunaj studoj.

Laŭ formo kaj enhavo la plej bonaj infankantoj karakteriziĝas per ekzakta direkteco al la infano. Tiuj kantoj altiras la atenton de la aŭskultantoj per sia sincereco, per la konkretaj simplaj muzikbildoj, per melodio facile memorfiksebla. Ekzemple la kanto „Estu ĉiam la suno“ de Arkadij Ostrovskij laŭ teksto de Lev Oŝanin. Tiu kanto ricevis vastan popolan rekonon kaj varman akcepton ne nur inter la infanoj, sed ankaŭ en la plenkreskulaj medioj. Karaktera estas ĝia melodieco kaj precipe ĝia enhavo, kiu plaĉas al ĉiuj:

Estu ĉiam la suno,
estu ĉiam ĉielo,
estu ĉiam patrino,
estu ĉiam mi mem!

La aŭtoro parolas per la lingvo de la nuntempa infano, penetras en la infanan vivon, eĉ rigardas per la okuloj de la infano.

Kiaj esperantlingvaj infankantoj ekzistas nuntempe?

Mi trarigardis multe da kantlibroj, eldonitaj ekde 1908 ĝis nun („Kongresa kantareto“, eldonita en Drezdeno 1908, „Internacia kantaro“ de Paul Bennemann, eldonita en Lajpzigo 1929, „Esperanto-kantareto“, „Sveda kantareto“, „La Najtingalo“, „Komuna kantlibro“ ktp.), entute ĉirkaŭ 25 kantlibroj. Mi konstatis, ke la E-infankanto tute mankas, aŭ oni povas renkonti ĝin tre malofte, tio estas precipe en E-traduko.

Gi mankas eĉ en multaj lernolibroj de E-o por infanoj.

El la trasdutitaj 100 E-infankantoj ĉirkaŭ 50—60 estas vere infanaj. Sed kiam la kanto estas vere infana? Ni devas konscii, ke la infanoj estas tre impresigemaj pri ritmo kaj takto. Krome, ili preferas kantojn, en kiuj estas recitativoj kaj ĉiaspecaj skandadoj. Ekzemple en la kanto „Dipidu“ (el Ugando):

Venu al la kunven',
dancu ĝis la maten',
dip-dip-dip, di-pi-du (2)

aŭ en la belga infankanteto „Ĉiuj fiŝetoj“:

Ĉiuj fiŝetoj naĝas en la akvo,
fal-de, ral-de, li-re (2)
fal-de, ral-de, raldera
hop-sa-sa. . .

Tiuj skandadoj estas karakterizaj por multe da infankantoj.

Alia specifaĵo de la infankanto estas la movoj per manoj aŭ piedoj dum la kantado:

Klaku per la manoj:
klak — klak — klak!
Batu per piedoj:
bat — bat — bat!

La kanto plenumiĝas per samtempa klakado kaj piedbatado. Lastatempe tiu ĉi tendenco disvastiĝas ĉiam pli kaj pli.

La infana kanto respegulas la specifajn trajtojn de la infana vivmaniero, sfero, ludoj, naturaj karakterizaĵoj ktp. En la buŝo de infano de alia popolo la kanto iĝas efika rimedo por edukado pri infana amikeco.

La vivo starigas antaŭ ni novajn taskojn, ĝi postulas decidon de novaj problemoj kaj respegulas novajn temojn. La pacproblemo estas ofte ĉefa temo de la infankantoj:

De la maro ĝis la monto
eĥu tra la spaco,
krio de l'infana fronto:
„Vivu la mondpaco!“

(„Marŝo por la infanoj“ — teksto Julio Baghy, muziko Balassa P. Timas).

Kun simila enhavo estas ankaŭ la kanto „Antaŭen pacbatalantoj“ de D. Terziev en la kantlibro „Flugas kanto tra la mondo“ (Sofia, 1968):

Ni, ĉiuj bulgaraj infanoj, -
kaj ĉiuj infanoj de l'mond'
nun levas amike la manojn
por paco kaj hela estont'.

Dum la kuranta 1979 jaro oni en la tuta
mondo celebras la Internacian Jaron de
Infano. La e-istoj devas doni sian kontri-
buon. La komponistoj devas komponi no-
vajn E-infankantojn. Oni devas eldoni li-

brojn kaj prepari gramofondiskojn kun tiaj
kantoj, aranĝi festotagojn de la infana
kanto, de infanaj ĥoroj, orkestroj ktp. La
muzikistoj e-istoj havas la devon solvi la
demandon: kiamaniere la muziko en E-o
povas malfermi por la infanoj novajn hori-
zontojn en la internacia vivo. La infanoj
kaj junuloj estas la floroj de la homaro.
Ili estas nia espero por pli bona estonteco
de la mondo. Ili meritas pli da zorgoj.

Distroĵ

LA DOLĈA VIVO GEEDZA

— Mi volas eksedziĝi.
— Kial?
— Ĉar mi suspektas mian edzon, ke li ne
estas patro de mia infano.

*

Ŝi (matene):
— Karulo, ĉi-nokte mi sonĝis, ke vi donacis
al mi mil kronojn.

Li:
— Ĉu mil kronojn, karulino? Nu, tio
estas iom tro multe, sed por ke vi ne diru,
ke mi estas avarulo, vi povas reteni ilin. . .

*

— Hodiaŭ nokte estos ŝtormo, — diras
la edzo elirante vespere el la hejmo.

— Tute certe, se vi ne revenos ĝustatempe
hejmen! — respondas la edzino.

*

Edzino telefonas el banloko al sia edzo:
— Dum kvin semajnoj mi maldikiĝis tiel,
ke mi perdis duonon de mia pezo. Kiel longe
mi ankoraŭ restu?

— Ankoraŭ kvin semajnojn, mia kara, —
respondas la edzo senhezite.

— Morgaŭ estas la datreveno de nia geed-
ziĝo, — diras la edzino. — Ĉu mi ne mortigu
anseron?

— Kial? Ĝi ja ne kulpas pri tio.

*

Estonta patro malpacience promenadas
antaŭ la naskejo. Fine la flegistino vokas
lin kaj diras:

— Gratulon! Vi havas du ĝemelojn, du
knabojn.

— Kompreneble, tion mi povis atendi!
Si estas sekretariino kaj al kutimiĝis fari
ĉion kun kopiojaŭ. . .

*

Demandas la edzo sian „sepan sakramenton“:

— Karulino, kion vi preferus kiel dona-
con por la deka datreveno de nia geedziĝo:
ĉu peltmantelon aŭ libertenpon ĉe la maro
en Bulgario?

— Ni veturu al Bulgario, tie la peltman-
teloj estas malpli kostaj, — respondas la
edzino.

*El «Gaja kajero» n-ro 2
(aldonaĵo de «Esperantisto Slovaka», 1978)*

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ, NASKITAJ EN APRILO

Pli bone minuton da libero ol jarcenton da sklava vivo.

Georgi Rakovski, revoluciulo kaj verkisto
(. . . IV. 1821 — 3. X. 1867)

Prikantante la homon la poetoj de ĉiuj epokoj senmortigis sian nuntempon.
La maltrankvilo ĉiam donas vivon al la arto. La indiferenteco mortigas ĝin.

Veselin Hanĉev, poeto
(4. IV. 1919 — 3. XI. 1966)

La nomoj de tiuj, kiuj pliigas la sciojn kaj evoluigas la sciencon, estas gloraj, sed
ties gloro paliĝas antaŭ la gloro de homoj, kiuj batalas por la libero de la homaro, por efek-
tivigo de la grandaj principoj de egaleco kaj frateco.

La malklereco ordinare timas ĉion novan.

Homo sen idealo estas besto.

La marksismo, la scienca socialismo estas granda instruo pro tio, ke ĝi donas ankaŭ la
praktikajn-organizajn rimedojn por sia triumfo.

Dimitro Blagoev, fondinto de BKP
(14. IV. 1856 — 7. V. 1924)

Elektio kaj traduko: Stojan Kostadinov

Verdaj steloj

Elvira Lippe

MI KONAS LA KOLOROJN

Blanka estas ŝaŭmo mara,
verda estas musk' arbara,
ruĝa estas vin' natura,
bruna estas kverka glano,
blua estas flor' cejano,
lila estas kamp' erika,
nigra estas kato Mika.

KION ŜATAS BIRDOJ

Cikonio kaptas ranojn,
sed garolo fendas glanojn.
Nokte musojn ĉasas strigo,
fremdajn ovojn ŝtelas pigo.
Kardel' sensemigas kardon,
parueto frandas lardon.
Fiŝkaptisto estas laro,
fiŝojn kaptas ĝi el maro,
kaj hirundo flugas sage,
kulojn glutas ĉiutage.
Graĵojn serĉas emberizo,
sturnoj flugas al ĉerizoj.
Diru vi, se ne sekreto:
kion ŝatas pasereto?

JUNPIONIRA E-KURSO

Jam 10 jarojn ekzistas la popola legejo (kulturdomo) „Iskra“ en kv. „Ĥristo Miĥajlov“ (Zapaden Park) — Sofio. En ĝi ĉiam bolas riĉa kultura vivo. Ĉiutage funkcias diversaj rondoj: lingvaj, muzikaj, literatura, pri arta parolo, ankaŭ pupteatro k. a. En tiu lasta partoprenas 10—14-jaraj gelernantoj, kiuj kelkfoje jam okupis la unuan lokon en tuturbaj konkuradoj.

Al la pupteatra rondo donis sian atenton nia fervora s-anino Zora Oŝanska. Ŝi organizis kaj gvidas tie E-kurson, kiun vizitas 12 lernantoj. Ĝis nun estas atingitaj tre bonaj rezultoj. La lernantoj preparas spektaklon, kiu baldaŭ estos preta.

La junaj e-istoj (sur la foto malsupre) deziras korespondi tutmonde. Skribu al komuna adreso: Ĉitaliŝte «Iskra», kvartalo «Ĥristo Miĥajlov», Esperanto-Kurso (Oŝanska), Sofio Bulgario.

El la kongreslando

En u. Zurich (Zuriko) — Svislando ĉiujare en aprilo oni festas la printempon per bruligo de la vintro — la neĝa fantomo. La infanoj iras kostumitaj laŭlonge de la ĉefa strato ĝis la lago, akompanataj de muziko, tamburoj, kavalerio. La solenaĵo finiĝas per bruligo de la fantomo.



(El paĝo II)

H. Bein — 409 Halle-Neustadt, Block 147/2 (40-jaraj geedzoj — kun bulgaroj pri bk, pm, gram. diskaj, turismo).

Pollando

Maria Zejer — 43-450 Ustron, Oŝ. Brody 3 m. 10 (48-jara oficistino — pri ĉi kun ĉi).

Aleksandra Zabinska — ul. Przemyslowa 28, 14-150 Olsztynek (arbaro, ĉasado).

Malgorzata Zaniecka — ul. Szarydi Szeregov 2/B55, 85 829 Bydgoszcz (17-jara lernantino — turismo, historio, bk, pm, insignoj).

Jrena Niepsuj — Biala Nizna 69, 33-330 Grybow, woj. Nowy Sancerz (18-jara — en pola, rusa, germana, E-o, pri filmoj, libroj, turismo, muziko).

Zdzislaw Chelstowski — ul. Platnerzy 3 c/3, 73-110 Stargardszcz (19-jara lernanto — junulara muziko, sporto, vivo de la popoloj, E-eldonaĵoj, koloraj bk).

Jerzy Leszczynski — 57—240 Kamieniec Ŝkolnah (kun ĉi pri literaturo, moderna muziko, sporto, bk, pm, gram. diskaj ktp).

Sovetunio

Laimundas Abromas-Jurbarkas, 234432, p. Pilis — 1, Litovio (22-jara pentristo — pri ĉi, precipe pri junularaj problemoj)

A. Parievskij — str. Matrosova 10, kv. 18, 310 124 Harkov-124 (40-jara — kun ĉi — pm)

Ignatov Andrej — Gagarina 102-a, kv. 27, Talgar, 483310 Kazaĥio (12-jara lernanto — kun ĉi pri ĉi, pm, bk)

Valerijus Rudzinskas, Jubarko raj., 234442, Ŝtakiai, Litovio (18-jara — muziko, lingvoj, literaturo, pm, bk, gram. diskaj — en rusa, E-o, germana, latina)

Lapšin Lev — 683016 USSR, Petropavlovsk — Kamčatskij, ul. Prjevalskogo 28, kv. 4 (48-jara geologo — kun geologoj el ĉi, serĉas ĉiujn aŭ apartajn volumojn de



„Internacia geologio“)

Oleg Kravec — str. Lejnevskaĵa d. 146 — 21, Ivanovo 153 032 (16-jara lernanto — teatro, lingvoj, sporto ka.)

Anatol Guk — 347 900 Taganrog, glavpoĉtamt, ab. jaŝĉik 43 (28-jara oficisto — kun ĉi pri ĉi, aparte pri libroj, gr. diskaj, bk)

Viktor Buckij — Sĉorsa 45-33, SU-340050 Doneck (31-jara — kun ĉi pri ĉi)

Tunev Vladimir — ul. Maŝinistov 20 kv. 1, 614 040 Perm (42-jara kun ĉi pri ĉi)

Juoza Sarapinas — Aukstikaniu km, Svyturio kol, 235250 Pasvalys, Litovio (17-jara — kun ĉi pri ĉi, bk, pm)

Juoza Vedaras — 235240 Litovio, reg. Pasvalis, p. Joniŝkelis, vil. Pamaĵupiaf (20-jara, kun ĉi pri ĉi, pm, bk)

Ljuba Stepanovna Perekrestenko — ul. Naĥimova 15, Talgar 2, 483310 Alma-Atinskaja obl. (15-jara lernantino — kun ĉi pri ĉi, bk, pm, esperantaĵoj, gr. diskaj)

Anatolo Ionesov — ul. Sovetskaja 53, 703 000 Samarkand, Uzbekio (22-jara fraŭlo — kun ĉi pri ĉi)

Ŝafkat Hamrakulov — ul. A. Ikramova 20, kv. 6, 703048 Samarkand, Uzbekio (21-jara fraŭlo)

Vladimir Lemelev — ul. Engelsa 5, 703 000 Samarkand, Uzbekio (40-jara medicinisto — kun ĉi pri ĉi)

Marina Palĥĉjan — ul. Termezskaja, pr. 2, d. 23, 703 014, Samarkand, Uzbekio (21-jara fraŭlino)

Elena Kocan — ul. 23 Partsjezda 22, kv. 41, 703 050 Samarkand, Uzbekio (22-jara)

Cuckiridze Lamara — 380 007, Tbilisi-7, Lermontovi str. 23, l. 8 (35-jara inĝenerino)

Dataŝvili Mareĥi — 380092, Tbilisi-92, Bogvi str. 38 (23-jara fraŭlino)

Kobalava Nino — 380 003, Tbilisi-35 str. Telavi 35 (25-jara fraŭlino)

Demetraŝvili Lali — 380035, Tbilisi-35, II mik. raj. II kor. l. 134 (26-jara fraŭlino)

Gogotiŝvili Cicino — 380092, Tbilisi 92, Tianeti str. 39 (26-jara fraŭlino)

Saribegova Nana — 380003, Tbilisi-3, Ŝaŭmiani str. 34-a (24-jara fraŭlino) -

Studentoj de 17 ĝis 26 jaroj dez. korespondi tutmonde. Komuna adreso: USSR-Tbilisi-28, pr. Ĉavĉavadze 1, Universitato, Komitato de Komsomolo, Esperanto (kun ĉi pri ĉi).

La supra komuna adreso validas ankaŭ por la E-instruistino de la studentoj Nana Ĥizambareli (kun ĉi pri ĉi).

En Radomir forpasis

Anco Talambazov

fondinto de la loka E-societo „Fajrero“, sindona e-isto, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo.

Niajn kondolencojn !